KARL MINOR

Pro Dio! ne Esperantiston!

Unu akto

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel
G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

GERMANA ESPERANTISTO

Monata gazeto por la disvastigo de la lingvo Esperanto kun instrua kaj literatura aldono

ESPERANTO-PRAKTIKO

Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek

Respondeca redaktoro: Arnold Behrendt

La plej malnova el la nun ekzistantaj E-gazetoj, redaktata ĉefe nur en Esperanto. Ĝia ĉiam interesa enhavo konsistas el originalaj aŭ tradukitaj artikoloj pri ĉiuj temoj, propagando, kroniko, literaturo, ekzercoj por komencantoj kaj progresantoj, prilingvaj diskutoj, konkursoj, bibliografio, korespondo ktp.

Pri abonprezo oni demandu la eldonejon.

Por specimena numero oni sendu 0.25 Gm aŭ 1 novan respond-kuponon, kiuj ĉe abono estos repagataj.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Berlin SW 61, Wilmsstrasse 5

KARL MINOR

Pro Dio! ne Esperantiston!

Unu akto

ludota parte en Esperanto, parte en nacia lingvo

Originale verkita

GRUPPO ESPERANTISTA MILANESE
PIAZZA OBE DANI, 1
MILANO

1924
Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

Alle Rechte vorbehalten
Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj
Copyright 1924 by
Ellersiek & Borel G. m. b. H., Berlin

La rajto pri prezentado estas akirebla per aĉeto de minimume 5 ekzempleroj de ĉi tiu libreto. Prezentado laŭ kopiitaj rolmanuskriptoj ne estas permesita.

Personoj

S-ro Meyer, malgranda eksportisto
Paŭla, lia filino
Petro, ŝia fianĉo
S-ro Nielsen, Dana kliento de s-ro Meyer

La Sceno okazas en la loĝejo de s-ro Meyer, en elegante aranĝita ĉambro kun kameno. Antaŭ ĉi tiu staras granda skreno. Tri pordoj.

Rimarkigo

Por prezentado la nomoj *Meyer, Paŭla* kaj *Petro* estu anstataŭigitaj per nomoj tre konataj en la lando, en kiu la komedieto estas prezentata. En Skandinavujo oni elektu ne-skandinavan nomon anstataŭ Nielsen.

La kursive presita teksto estu antaŭe tradukita kaj, dum la prezentado, parolata en la nacia lingvo de la lando de la prezentado. La kromaĵo restas Esperanta.

UNUA SCENO

Paŭla kaj Petro

Paŭla (sidas plorante ĉe tablo).

Petro (gaje envenas. Vidante la plorantan Paŭla-n, li ekmalgajiĝas kaj kuras al ŝi. Karese). Vi ploras, karulino mia? Anstataŭ ol ĝoji, ke venas mi, via fianĉo?

Paŭla (sin ĵetas al lia brusto). Ho, Peĉjo vi ja ne scias, kiom mi estas malfeliĉa!

Petro. Kvankam vi scias, ke mi amegas vin? Kio do povas plorigi vin?

Paŭla (plorante pli forte). Ho, Peĉjo! Ĝuste pro tio, ke mi scias, ke vi tiom amas min, mi estas malfeliĉa. Denove hodiaŭ mia patro ripetis al mi, ke nia amo ĉiam restos senŝanca.

Petro (ridetante). Kaj ree pro la sama stulta kialo?

Paŭla (mirante). Vi ridas? Ĉu ne estas sufiĉe serioze, ke li ne volas doni min al vi, ĉar vi estas Esperantisto? Homo, li diras, kiu havas tiel sensencajn ideojn, ne estas sufiĉe serioza komercisto. Kaj al tia mi ne apartenu!

Petro (retenante ridadon, patose). Mia koro al mi diras, ke la tempo ne estas malproksima, kiam li mem lernos Esperanton, kaj kiam li mem petos min, kiun li nomas ne sufiĉe bona komercisto, anstataŭi lin en komercaj aferoj!

Paŭla (ĝemante). Ho, karulo mia, ke Dio plenumu ĉi tiun profetaĵon!

(Elektra sonorilo eksonas, kaj ambaŭ ektimas.)

Paŭla (kaptas Petron ĉe la maniko kaj tiras lin maldekstren). Jen estas mia patro venanta el la oficejo. Rapide eniru ĉi tien kaj estu tute silenta. Mi enŝlosos vin kaj envenigos la patron. (Petro elscenejiĝas maldekstren. Ŝi ŝlosas la pordon post li kaj enpoŝigas la ŝlosilon. Poste ŝi eliras malantaŭen.)

DUA SCENO

Paŭla kaj s-ro Meyer

S-ro Meyer (furioza). *Kial do daŭris tiom longe, ĝis kiam vi malfermis?*

Paŭla (konfuze). Mi leg . . . . eh . . . . *Mi ĵus legis tiom interesan libron, kaj mi ŝajne ne tuj aŭdis la sonorigadon.*

S-ro Meyer (dubante). *Hm . . . Kredeble vi ree pensis pri via fianĉaĉo. Sed vi ja scias, kion mi al vi diris ĉi matene!* (Pli kaj pli furioza) *Ho, tiuj Esperantistoj! Eĉ la plej prudentan hejmon ili frenezigas! Ankaŭ mia nova Dana**)

*) En Danujo diru „Germana", „Franca" a. a.

kliento ŝajne malsaĝiĝis. Mi ĝojas pri li, mia unua eksterlanda kliento post la milito, kiel eble plej faciligas al li la interrilaton kun mi kaj skribas al li Dane), tiom bone kiom mi scipovas. La unuajn leterojn li repondas al mi Dan*)-lingve, kaj hodiaŭ — jen kion li faras!* — (Li elpoŝigas leteron.) *Li skribas al mi en Esperanto! . . . . Unuamomente mi ja volis ĵeti la leteron en la paperkorbon. Sed mi ja devas scii, kion ĝi enhavas! Eble enestas mendo. Do kion fari? Mi devas preni la malgrandan libreton, kiun li aldonis . . . .*

Paŭla (flanken). . . . . *Ho jes! Ĉefeĉa ŝlosilo! . . . .*

S-ro Meyer (daŭrigante). . . . . *kaj devas elserĉadi la vortojn. Ho, kia frenezaĵo!* (Li elscenejiĝas dekstren.)

TRIA SCENO

Paŭla kaj Petro

Paŭla (post mallonga meditado). *Ne! . . . . Kaŝe mi devis lerni Esperanton . . . . Tial nun mi ankaŭ ne helpos lin! . . . .* (Post denova paŭzeto) *Sed strange . . . . la profetaĵo de Petro parte jam nun efektiviĝas! . . . . Pro Dio! Li ja ankoraŭ estas tie en la ĉambro! . . . . Mi devas eligi lin, por ke paĉjo ne renkontu lin ĉi tie.* (Ŝi malŝlosas la maldekstran pordon.)

*) Eu Danujo diru „German-“, „Franc-“ a. a.

Petro (envenas ridante). Nu, kion mi diris?

Paŭla. Jes, Peĉjo, efektiviĝis kiel vi diris: la patro jam okupiĝas pri nia lingvo kaj tradukas Esperantan leteron.

Petro. Atentu: jam hodiaŭ li aliiĝos sian opinion pri la tiom malamata de li lingvo! .... Sed nun mi rapidege foriru. Se via patro min trovus ĉi tie, estus malutilige por nia amo. (Ambaŭ elscenejiĝas malantaŭen.)

KVARA SCENO

S-ro Meyer, poste **Paŭla**

S-ro Meyer (envenante). *Tiu malbenita letero! .... Sed fakte Esperanto tamen ne estas tiel nepraktika, kiel mi pensis! Ankoraŭ antaŭ duonhoro mi havis eĉ ne la plej etan komprenon pri ĝi, kaj nun mi jam tute sola komprenis leteron skribitan en Esperanto. ....*

Paŭla (envenas de malantaŭe).

S-ro Meyer (al ŝi). *Nu, Paŭla, mi fakte ne eraris: Tiu sinjoro Nielsen* (montrante al la letero, kiun li tenas en la mano) *vere freneziĝis! Aŭskultu, kion li skribas:* (Li legas malrapide kaj balbutante)

Estimata sinjoro,

Mi estas certa, ke vi jam aŭdis pri Esperanto, sed ke vi — kiel la plejmulto de la komercistoj — estas kontraŭema al ĝi. Tamen, se vi volas negoci kun mi, vi devas lerni la lingvon. Kelkajn

tagojn post tiu ĉi letero mi alvenos ĉe vi, kaj ĉar komprenas nek vi mian, nek mi vian lingvon, nur unu rimedo ekzistas, por ke ni komprenu nin reciproke: Esperanto . . . . .

Sed kial legi? Vi ja ne komprenas Esperanton!

Paŭla (kun komika seriozo). *Eĉ ne unu vorteton!*

S-ro Meyer. *Ĉu ne vere? . . . . Mi nun iros en mian ĉambron kaj lernos. Kaj se iu volos viziti min: mi ne havas tempon!* (Li eliras dekstren.)

KVINA SCENO

Paŭla sola

Paŭla. *Nun fakte la antaŭdiro de Petro ŝajnas realiĝi. Tion mi nepre rakontu al li, kiam mi lin revidos.* (Ŝi eliras maldekstren.)

SESA SCENO

Petro, poste **Paŭla**

Petro (ŝovas la kapon tra la duone malfermita pordo. Vidinte, ke neniu enestas, li envenas.) *Ŝajnas al mi, ke li jam lernas Esperanton.*

Paŭla (venas de maldekstre kaj vidas Petron. Time). Jen vi, Peĉjo? Se mia patro vin vidus . . .

Petro. Ĉu li ne foriris en la oficejon?

Paŭla. Ne. Li estas en sia ĉambro kaj lernas Esperanton! . . . Sed diru do, Peĉjo: kiel vi povis antaŭscii ĉion ĉi?

Petro (indiferente). Nu .... tute simple .... mi havis .... antaŭsenton.

(Sonoras)

Paŭla (ektimiĝante). Sonoras! ... Mi vidu, kiu estas. (Eliras malantaŭen.)

SEPA SCENO

La antaŭaj kaj s-ro Nielsen

Paŭla (post la scenejo). *Jes, mia patro estas endome. Sed li estas troŝarĝita de laboro; li ne povos akcepti vin.*

S-ro Nielsen (ankaŭ post la scenejo). *Mi jam letere avizis min al s-ro Meyer. Li atendas min. Mia nomo estas Nielsen.*

Petro (kun plej granda ĝojego). *Hura! Nielsen alvenis. Nun mi baldaŭ venkos!*

Paŭla (envenante kun s-ro Nielsen). *Mi tuj anoncos vin.* (Al si mem.) *Strange: li ja parolas Germane.**) (Ŝi eliras dekstren.)

OKA SCENO

Petro kaj s-ro Nielsen

Petro (aliras — post la eliro de Paŭla — al s-ro Nielsen kaj ĉirkaŭpremas ties manon). Ho, bonan vesperon, tre kara amiko mia! Kiom bone sukcesas nia ruzaĵo! Sed nun mia koro bategas kiel forĝista martelo. La horo de la

---

*) Resp. „Angle", „France" ktp. laŭ la lando de la prezentado.

decido estas veninta. Mi kaŝos min post tiu skreno kaj observos, kio okazos. (Li iras post la skrenon.)

NAŬA SCENO

La samaj, Paŭla kaj s-ro Meyer

S-ro Meyer (al Paŭla, envenante). *Vi diras, ke sinjoro Nielsen jam venis? .... Kaj mi havas pri Esperanto eĉ ne scieton.*

S-ro Nielsen (al s-ro Meyer). Mia nomo estas Nielsen.

S-ro Meyer (foliinte en la ŝlosilo, balbutante). Bonan tagon!

S-ro Nielsen. Mi venis pli frue, ol mi intencis, sed mi esperas, ke mi vin ne ĝenos.

S-ro Meyer (ree serĉas nervoze en la ŝlosilo). Jes .... bonan tagon .... jes!

Petro (rigardas — ne rimarkate de s-ro Meyer — super la skrenon kaj ĝojas pri la nervozeco de s-ro Meyer. Li faras ĝojajn signalojn al s-ro Nielsen.)

Paŭla (rimarkas lin kaj pantomime montras al li, ke li rekaŝiĝu.)

S-ro Nielsen (al s-ro Meyer). Kiel mi vidas, vi jam komencis okupiĝi pri Esperanto ....

S-ro Meyer (kiel antaŭe). .... Jes .... bonan tagon .... jes .... (Li ekkaptas la brakon de Paŭla kaj trenas ŝin tute antaŭen ĝis la rampo.) *Ho, Paŭla, kion mi faru? .... Se nur via Petro estus tie ĉi!*

Petro (elvenas el post la skreno). *Jen mi estas, sinjoro. Per kio mi povos servi al vi?*

S-ro Meyer (malpezigite). *Dankon al la Ĉielo, ke ĝi sendis vin al mi en bona horo! Mi ja malpermesis al vi, enveni mian domon; sed mi ne plendos kontraŭ vi pro rompo de l' hejma paco, se vi volas helpi al mi.*

Petro. *Se tio estos ebla al bona komercisto, kia mi estas.*

S-ro Meyer. *Mi ĝuste bezonas vian kapablon plej gravan por bona komercisto: Esperanto.*

Petro. *Kaj estas* ***vi****, kiu tion diras?*

S-ro Meyer. *Ja ne faru longajn antaŭparolojn, sed interpretu al mi la Esperanton de tiu sinjoro.*

Petro (ŝajne nedecide, por turmenti lin). *Sed nur je unu kondiĉo: se vi konsentas pri geedziĝo inter Paŭla kaj mi!*

S-ro Meyer (kontraŭvole, ĉar ne estas eliro). *Nu . . . . jes!*

Petro. *Hura!* (li disetendas la brakojn).

Paŭla (saltas al lia kolo).

S-ro Meyer (al Petro). *Sed nun ne faru longajn scenojn. Fine demandu al sinjoro Nielsen, kion li deziras.*

S-ro Nielsen. *Du aferojn mi deziras: plejeble fruktodonan rilaton inter vi kaj mi . . . . kaj ke vi formetu ĝisfunde vian antaŭjuĝon kontraŭ Esperanto.*

S-ro Meyer (mirante). *Ĉu vi parolas Germane**)?

S-ro Nielsen. *Jes, sinjoro . . . . kaj krom tio mi estas bona amiko de via estonta bofilo, kiu antaŭ nelonge plende petis min, helpi al li, venki vian antaŭjuĝon kontraŭ Esperanto.*

S-ro Meyer. *Kaj mi tion eĉ ne scietis! . . . . Mi ja konvinkiĝis, ke povas esti momentoj, en kiuj oni nepre bezonas Esperanton. Sed se ĉiu Esperantisto estas tia „mistifikisto" kia vi du, mi ja estis prava, dirante: „Pro Dio! ne Esperantiston!"*

---

*) Resp. „France", „Angle" ktp. laŭ la lando de la prezentado.

(Kurteno)

Verkoj por Germanlingvanoj

de

KARL MINOR

Esperanto-Deutsches Handwörterbuch kun detala pritrakto pri la vortfarado per gramatikaj finaĵoj kaj afiksoj. (En presado.)

Ĉi tiu E-Germ. vortaro estas la plej kompleta verko de sia speco kaj speciale taŭga por la ĉiutaga uzado.

Deutsche Redensarten in Esperanto. Germana-Esperanta Esprimaro laŭ la Proverbaro Esperanta de Dro L. L. Zamenhof.

En ĉi tiu libro la verkinto kompilis proksimume 500 esprimojn. Ĝia enhavo estas modela kaj tre utila por komencantoj kaj progresintoj. Ankaŭ alilingvaj kompetentuloj Esperantistaj multe laŭdis la verkon post ĝia elveno. Nuna prezo . . . . . **0,70 Gm.**

672 Zamenhofaĵoj. Germanaj esprimoj en Esperanto, kolektitaj el la Zamenhof-a traduko de la rakonto „Marta“ de Eliza Orzeszko. (En preparo.)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Berlin kaj Dresden

Nova Esperanto-Biblioteko

(Formato: 11×16 cm)

Noj. 1-4 estas primilitaj eldonaĵoj de Germana Esperanto-Servo, kiuj nun malaktualiĝis.

No. 5. Argus: Pro kio? Internacia kriminalromano originale verkita.

No. 6. Heine, Heinrich: **Elektitaj Poemoj.** El germana lingvo tradukis Friedrich Pillath. Dua, kompletigita eldono.

No. 7. William, P.: **Legolibro.** Ia volumo: Internacia Anekdotaro.

No. 8. Hauff, Vilhelmo: **La kantistino.** Novelo. El germana lingvo tradukis Eugen Wüster.

No. 9. Lessing, Gotthold Ephraim: **Natan la Saĝulo.** Drameca poemo en kvin aktoj. El germana lingvo tradukis Karl Minor.

No. 10. Elin-Pelin: Elektitaj Prozversaĵoj kaj Rakontoj. El la bulgara originalo tradukis Ivan H. Krestanoff. (En preparo.)

Ĉiuj volumoj estas bele kartonitaj

Prezojn vidu en nia katalogo La kolekto estas daŭrigota.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Berlin kaj Dresden

Abonu la gazeton

ESPERANTO TRIUMFONTA

Semajna

◆

Aktuala

◆

Grandformata

◆

Ilustrita

◆

Senpagaj monataj aldonoj:

„REVUO"

(literatura kaj popolscienca)

◆

„INTERNACIA KOMERCO"

◆

Senpagajn specimenojn petu de
Administracio de Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln
Germ.

ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

Ĝis nun aperis:

No. 1. Legolibreto, de J. Borel.

No. 2. Fabeloj de Andersen, tradukitaj el dana lingvo de Fr. Skeel-Giörling.

No. 3. Bona Sinjorino, novelo de E. Orzeszko, tradukita el pola lingvo de Kabe.

No. 4. Rusaj Rakontoj, de Mamin Sibirjak, tradukitaj el rusa lingvo de N. Kabanov.

No. 5. Don Kiĥoto en Barcelono, tradukita el hispana lingvo de Fr. Pujulà y Vallès.

No. 6. El la Biblio, trad. Dro L. L. Zamenhof.

No. 7. El Dramoj (fragmentoj), tradukitaj el germana lingvo de Dro L. L. Zamenhof.

No. 8. El Komedioj (fragmentoj), esperantigitaj de Dro L. L. Zamenhof.

No. 9. Praktika Frazaro. Dialogoj de la ĉiutaga vivo, kunmetis J. Borel.

Noj. 10-11 (duobla numero). **Japanaj Rakontoj.** El Japana lingvo kunmetis Ĉif Toŝio.

No. 12. Reaperantoj. Familia drama de Henrik Ibsen (1 a akto), trad. el norvega lingvo de O. Bünemann.

No. 13. Bulgaraj Rakontoj, el bulgara lingvo tradukis At. D. Atanasov.

Noj. 14-15 (duobla numero). **Amoro kaj Psiĥe** de Lucius Apulejus, el latina lingvo trad. Emilo Pfeffer.

No. 16. Komerca Korespondo, kunmetis J. Borel.

No. 17. Konsiloj pri Higieno, tradukis J. Borel.

No. 18. La Reĝo de la Ora Rivero de John Ruskin, el la angla lingvo tradukis Ivy Kellermann, A. M., Ph. Dr.

No. 19. Sinjoro Herkules. Unuakta burleskaĵo de Georg Belly, el germana lingvo tradukis H. Arntz kaj M. Butin.

No. 20. La lasta Usonano de J. A. Mitchell, el la angla lingvo trad. Lehm. Wendell.

No. 21. Hungaraj Rakontoj de Ferenc Herczeg, el hungara lingvo trad. A. Panajott.

No. 22. Nord-germanaj Rakontoj de Heinrich Bandlow, el platgermana lingvo tradukis Ella Scheerpeltz.

No. 23. Hispanaj Dramoj de Jacinto Benavente, tradukis Vicente Inglada.

No. 24. La Instituto Milner de Jean Jullien. Trad. el franca Lingvo la Lyon-a Grupo.

No. 25. Noveletoj el la Nigra Arbaro de Hel. Christaller. Trad. el germana lingvo Wilh. Christaller.

No. 26. La intervidiĝo kaj Nekonita Dialogo de Alfred de Vigny, el franca lingvo trad. Sam. Meyer.

No. 27. La Patrino de E. Zahn. El la Germana trad. J. Ŝmid.

No. 28. Elzasaj Legendoj. El germana lingvo tradukis Charlotte Pulvers.

Noj. 29-31 (triobla numero). **Sub la Neĝo.** Taglibro de juna loĝanto de la Jura-montaro de J. J. Porchat, el la Franca trad. J. Borel.

No. 32. La Amkonkurantoj. Triakta komedio, originale verkita de Reinhold Schmidt.

Ĉiu libreto enhavas 40—50 paĝojn

Prezojn vidu en nia katalogo. La kolekto estas daŭrigota.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Berlin kaj Dresden

III-C-3

Gotthold Ephraim Lessing

Natan la Saĝulo

Drameca poemo en kvin aktoj

El germana lingvo tradukita de

Karl Minor

(Nova Esperanto-Biblioteko No. 9)

Ĉi tiu fame konata klasika verko el la germana literaturo en majstre verkita Esperanto-traduko estis prezentata de eminentaj profesiaj aktoroj dum la XVa Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg! La traduko estas brile recenzita en la E-gazetaro.

Prezo 2,00 Goldmark

(Por eksterlando 1 Gm. = 0,24 Dol.)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

BERLIN SW 61, Wilmsstraße 5

Druck von Möller & Borel, Berlin SW 68.